

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2001



Belan someron al ĉiuj legantoj!

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 3313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Sekretario/Sihteri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449

Esa Lång, Lokinkatu 5, 15610 Lahti. ☎ (03) 735 2723

Päivi Saarinen, Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Jukka Vaijärvi, Neulapadontie 3 C 21, 00920 Helsinki. ☎ (09) 349 7334 ✉ jukka.vaijarvi@dinosoft.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Rituaali vai motivaatio?

Suomen Veromaksajain Keskusliiton Taloustaito-lehdessä 5/2001 psykologian tohtori, dosentti Kirsti Lonka toteaa, että suuri osa oppimistilanteista on aivan pielessä. Ja aikuiskoulutus – siihen käytetään toista miljardia markkaa vuodessa – on todella tehontonta. Ei ole harvinaista, toteaa dosentti Lonka, että koulutuspäivän ainoa idea on odottaa kaljalle pääsyä ja päivän anniksi jää vain hieno mappi, jota ei sen jälkeen edes koskaan avata. Koulutustilaisuus on rituaali, jossa alttarina toimii piirtoheitin. Tuntuuko tutulta?

Perinteinen luennoiva opetus ei Kirsti Longan mukaan ikävä kyllä palvele pääasiansa, oppimista. Luentoharhaksi kutsutaan hänen mukaansa käsitystä, että asiat on opitu, kun ne on opetettu. Kuitenkin luentojen sisällöstä muistetaan viikon päästä Kirsti Longan mukaan enää 20 prosenttia ja kahden viikon päästä vain 5 prosenttia. Sitä paitsi tämäkään muistaminen ei kerro dosentti Longan mielestä oppimisesta ja usein luennoilla opitaan jotakin aivan muuta kuin mitä luennoitsija luulee opettavansa. Usein pelkät vitsit muistetaan.

Dosentti Longan mukaan ihmisen aivot ovat pysyneet samanlaisina jo kymmeniätuhansia vuosia ja samoilla aivoilla on kehitetty aluksi alkeellisia työkaluja ja myöhemmin ydinfysiikkaa. Entä myötäsnytyiset kyvyt, lahjakkuudet? Psykologia näkee Kirsti Longan mielestä opittavissa olevina taitoina monet asiat, joita yleisesti pidetään kykyinä. Usein ihminen treenaa huomaamattaankin vahvoja alueitaan ja tulee niissä entistä paremmaksi. Uskomukset omasta oppimisesta rajoittavat oppimista paljon enemmän kuin kyvyt.

Oppiminen on tehokkainta ja opitut asiat helpommin muistettavia, jos sitä käyttää jo heti ongelmanratkaisuun oppimistilanteessa ja asiayhteydessä, joka on oppijalle merkityksellinen. Mielestäni esperantoa oppii parhaiten ryhmässä, jossa on eri kieltä puhuvia ihmisiä. Silloin esittäytymiset ja muut harjoiteltavina oleva alkeet harjoitellaan aidosti, kun ei voikaan käyttää omaa äidinkieltään avuksi.

Kielten oppimisesta Kirsti Lonka toteaa, että tehokas oppiminen on tuottamista. Jos opiskelee vierasta kieltä, tärkeää on tuottaa sillä sanoja ja lauseita. Itse olen huomannut, miten tärkeää on silloin tällöin kirjoittaa jotakin esperantoksi, ellei ole mahdollisuutta muuten kieltä käyttää. Monille esperanton harrastajille, joille esperantokontaktit ovat harvinaisempia asioita, kirjoittaminen on luonnollinen tapa pitää kielitaitoa yllä. Miten olisi vaikkapa esperantoksi pidettävä päiväkirja tämän kesän ajalta?

Yllättävää kyllä esperantoksi kirjoittaminen pitää yllä myös puhekieltä. Sama persoonahan siinä ilmaisee itseään puhumalla tai kirjoittamalla, väline on vain eri. Kesä kursseineen ja muine tapahtumineen on edessä. Kirsti Longan ajatuksia esittelemällä en halua masentaa yhtäkään kurssinvetäjää tai opiskelijaa. Kirsti Lonka opettaa lääkäreitä. Oppimista tuskin voidaan maksimoida, vaikka kasvatustieteilijät siitä uneksisivatkin. Kuten itse puheessa on redundanssia, liika-ainesta, oppimistilanteessakin sitä esiintyy. Oppijat ovat persoonaltaan ja myös kiinnostuneisuutensa puolesta niin erilaisia. Mutta hyvin motivoitunut opiskelija ylittää oppimistilanteen häiriötekijätkin.

Aimo Rantanen

Informantoj serĉataj

Okaze de jarkunveno ŝanĝiĝis la estraro de EAF. Dum la lastaj jaroj la kunlaboro inter la estraranoj estis tre fruktodona kaj la laboro ĉiam glate iris. Mi ankoraŭ kaptas la okazon danki al Seija Kettunen, Aini Vääräniemi, Jussi Jäntti kaj Markku Saastamoinen pro iliaj kontribuoj por la komuna antaŭenigo de Esperanto. Same mi volas bonvenigi Anna-Liisa Heikkinen, Eila Martin, Raita Pyhälä kaj Jukka Vaijärvi al la estraro esperante, ke la nuna periodo estu egale fruktodona kiel la pasintaj. Bone kunlaboranta estraro estas kerna faktoro de sukcesa agado de la asocio.

La estraro diskutis en sia aprila kunsido interalie pri informadaj aferoj. Estis konstatite, ke malgraŭ decidoj de la informada seminario (Jyväskylä, novembre 1999) pluraj aferoj ne evoluis kiel pensite. Okaze de la pasintjara KEF denove evidentiĝis, ke la asocio bezonas personon aŭ personojn, kiuj sekvu diskutojn en la gazetaro por eventuala reagado el la vidpunkto de Esperanto-movado. Estas grave, ke ni povu diskonigi la esencajn eblecojn kaj trajtojn de Esperanto por la granda publiko, almenaŭ se aperas malĝustaj asertoj pri ili. La gazetara diskuto postulas ioman rapidecon por la reagado, ĉar oni volonte ne permesas longan diskutadon pri unuopa temo. Tial estus bone reagi kiel eble plej rapide. La estraro kompreneble ne volas malpermesi kiun ajn esperantiston skribi al gazeto kiel privatulo, sed se la reago okazos en la nomo de la asocio, tiam ĝi certe estos pli bone konsiderata. Cirkonstancoj varias krome laŭ loko: en malgrand-

aj lokoj estas multe pli facile aperigi sian reagon ol en grandaj urboj. Estus do grave havi ankaŭ ian labordividon inter la asocio, lokaj kluboj kaj privataj esperantistoj. Finfine sendepende de tio, kiu reagis, plej grave estas, ke reagante oni restu en faktoj kaj nek troigu nek faru nekontroleblajn asertojn aŭ ĝeneraligojn.

Hodiaŭ la asocio mankas personon, kiu organizu tian reagadon. Sed unu persono ne povas fari la tuton. Almenaŭ estas bezonata helpo de lokaj kluboj kaj unuopaj esperantistoj por scii, kie aperis io reaginda aŭ reagenda. Estraranoj opiniis, ke estas la tasko de la prezidanto esprimi la oficialajn opiniojn de la asocio, sed necesas delegi almenaŭ parton de la tasko al alia persono, kiu intensive kunlaboru kun la prezidanto. Do, se vin interesas helpi en la supre menciita agado, tiam bv. kontakti la subskribinton.

Alia afero koncerne la gazetaron estas, ke denove la estraro sentas neceson peti, ke se ie ajn en la lando aperos gazetartikolo, kiu rilatas al Esperanto aŭ esperantisto, la asocio volas havi unu ekzempleron (aŭ kopion) en sia arkivo. Por posta studado de la movada historio estas grave, ke almenaŭ en unu loko estu kiel eble plej kompleta kolekto de artikoloj. Kaj la oficejo de la asocio estas certa tia loko. Por eviti tion, ke multaj sendu la saman artikolon, estus racie, ke almenaŭ la lokaj kluboj interkonsentu ĉe si pri unu persono, kiu sendadu eltranĉaĵojn. La estraro dankas pro jam senditaj kaj ankaŭ anticipe.

Bonan kaj refreŝigan someron al vi ĉiuj.

Jukka Laaksonen

Esperanto prezentis sin en lingvaj tagoj

Pro la Eŭropa jaro de lingvoj oni organizis ekspozicion en la Universitato de Oulu en la 10.-19. de aprilo. Prezentiĝis Esperanto, lingvoj finno-ugraj kaj lingvoj instruataj en la Lingva Centro de la Universitato.

Eblis konatiĝi kun lingvoj pere de diversaj paneloj, afiŝoj kaj videospektaklo kaj ankaŭ rete.

Harri *Anttila*, la direktoro de la Lingva Centro de la Universitato de Oulu, diris en sia malferma parolado, ke per la ekspozicio oni volas emfazi multlingvecon kaj ties riĉecon kaj kuraĝigi homojn studi lingvojn.

En la "lingva kafejo" estis i.a. renkontiĝo kun denaskaj parolantoj de diversaj lingvoj. Oni aŭdis la anglan, italan, hispanan, japanan, francan, svedan, germanan, finnan, rusan kaj Esperanton.

Lektoro Kaarlo *Voionmaa*, kiu ludis gravan rolon en la sukceso de la okazaĵo, diris en la intervjuo de loka radio, ke Lingva Centro kaj la Universitato volas proksimiĝi al la socio, kiu financas la agadon. – La Lingva Centro celas profili ankaŭ sin mem. Li ankaŭ diris, ke la ideo pri ĉi tiu ekspozicio venis al ni de la esperantistoj de Oulu. ▷



Esperantistoj en la "lingva kafejo": Kaarlo Voionmaa (meldekstre), Eila Martin, Auli Vihermä. Stanislawa kaj Allan Mehtonen kaj Erkki Röntynen. (foto: Eeva Joutsenoja)

Pri terminologio, leksikologio kaj tradukado

Homoj kiuj studas vortojn, ekzemple por kompili vortaron, povas esti nomataj "leksikologoj". Ili traktas ĝeneralan lingvaĵon kaj ordigas la vortojn en la alfabetan ordon. Inter la fruktoj de ilia laboro estas ordinaraj, diversgrandaj vortaroj. Ilia scienco, leksikologio, estas scio pri la deveno (etimologio), uzado kaj signifo de vortoj, dum terminologio koncernas nur fakajn vortojn, kiujn bezonas specialistoj por siaj teknikaj kaj sciencaj fakoj.

Estas dirite, ke ĉiu lingvo kapablas esprimi ĉion, tamen malmultaj lingvoj havas riĉan fakan vortaron. Tiurilate preskaŭ ĉiuj lingvoj malpli riĉas ol la angla. Kiam la sciencoj, tekniko kaj diversaj fakoj pli kaj pli evoluas, ni ekbezonas novajn terminojn por precize nomi la aperintajn novajn aĵojn kaj fenomenojn. Tamen ne indas nur imiti la anglajn terminojn imagante, ke tio solvos la

mondskalajn problemojn. Lingvistoj devas daŭre strebi por krei novajn terminojn kaj harmoniigi la nociojn kaj terminojn en diversaj lingvoj. Nuntempe en Esperantujo estas prilaborataj ekzemple terminaroj pri betono kaj astronomio, kaj Esperanto pli riĉas ol multaj aliaj lingvoj rilate la fakajn terminojn. Inter la plej novaj rezultoj de la terminara laborado estu menciitaj *Lexicon sylvestre* (1995) pri arbaroj kaj *VIC Railway Dictionary* (1997) pri fervojoj. Inter la terminaraj lingvistoj Esperantaj de la frua 20a jarcento estas memorindaj Eugen Wüster (germano) kaj Ernest Drezen (latvo, sovetiano).


Ankaŭ komercistoj kaj studentoj bezonas terminarojn. Oni ja devas precize scii, kio estas vendata kaj kio estos aĉetita. Inĝenieroj kaj artistoj ne povas ellerni sian metion sen la priaj lingvaĵoj. Al ni ĉiuj estas iom

▷ Laŭ la opinio de Voionmaa Esperanto estas unu el la eblecoj solvi lingvajn problemojn de vastiĝonta Europa Unio (EU). – Do, gravas, ke esperantistoj partoprenos al la konversacioj kaj debatoj pri la lingvaj demandoj de EU.

Krom la radio la ekspozicio kaptis abunde da publikeco. Tagĵurnalo *Kansan Tahto* intervjuis la prezidanton de Esperanto-societo de Oulu *Erkki Röntynen* kaj ĵurnalo *Oulu-lehti* intervjuis Allan *Mehtonen*. La Televidaj Novaĵoj de la Norda Finnlando raportis pri la celoj de la okazaĵo menciante ankaŭ Esperanton.

Oni menciu, ke la originala ideo aranĝi agadon pri la Jaro de Eŭropaj Lingvoj en Oulu estis letero, kiun ĉefdirektoro de UEA Osmo *Buller* sendis al Allan *Mehtonen*. Allan prezentis la leteron en la renkontiĝo de Esperanto-societo. Li ankaŭ kontaktis kun la Universitato de Oulu, kie doktoro Kaarlo *Voionmaa* varme akceptis la proponon. Nun ni diru, ke bona ideo kreskigis maturan frukton. Ĉu eblos organizi la saman ankaŭ en aliaj universitatoj?

Materialon por la lingvaj tagoj ni ricevis el EAF, UEA kaj de Anna *Ritamäki*. Ouluanoj dankas pro helpo. (E.R.)



*Fabien
Van Mook.*

konata la latin-devena “ĵargono” de kuraĉistoj. Baletoj kaj skermado uzas multajn franc-devenajn terminojn. Estas amuze, ke oni ne kuraĉas traduki ilin, sed oni devas alproprigi ilin lernante la fakon. Tio iom certigas la kompreneblecon inter diverslingvaj fakuloj kaj hobiistoj, sed tiaj fremdaj eroj en nialingvaj tekstoj bremsas kaj malhelpas la legadon. Ni devas akcepti tion, ke neniu termino en si estas esprimiva, se oni ne konas la fakon. Bona ekzemplo pri tio estas la lingvo pri komputiloj kaj interreto. Instruado kaj konsilado pri la fako estas nedisigible interplektita kun la lingvo. Aldone al novaj terminoj kaj nocioj oni devas lerni novajn signifojn por vortoj antaŭe konataj en alia senco.

Kiel siajn fontojn terminologio uzas gazetarajn artikolojn, lernolibrojn, katalogojn, interreton kaj, se temas pri Esperanto, la Esperanto-Bibliotekon en Vieno, sed antaŭ

ĉio li devas certiĝi, precize kion homoj en diversaj landoj havas en sia kapo, kiam ili uzas ekzemple la vorton por ”martelo”. La marteloj malsamas en landoj kiuj uzas ĉefe lignon (martelo duone fendita por eligi najlojn) kompare kun tiuj kiuj uzas ĉefe ŝtonon kaj brikojn (martelo senfenda). La ekzemplo estas tre konkreta, sed ion similan ankaŭ la vortaristo-leksikologo devas fari por helpi homojn kompreni, ke tradukado estas tikla afero pri la NOCIOJ, t.e. la imago kaj bildoj, la enhavo de nia kapo. Tial ne malmultaj homoj asertas, ke tradukado tute ne eblas. Aliaj asertas, ke tradukado plej ofte estas nur interpretado, kiun ĉiu faras laŭ siaj kapabloj, scioj, gusto kaj imago. Pri la tradukitaĵoj oni ĉiam pli malpli malsamopinias.

(La artikolo parte baziĝas sur prelego de Fabien Van Mook en Storckensohn, Francio, en aprilo 2001.)

Saliko

Ĉu ekzistas esperanta folkloro?

(La unua parto aperis en EL 2/2001)

Popolkredo

Interesege parto de folkloro estas popolkredo. Konkrete: Kian mondkoncepton ni havas, kiel ni vidas nin mem, kiajn valorojn, sintenojn, ideojn, tabuojn, sanktulojn, malamikojn ks. ni havas. Popolkredo simple vivas en la popolo. En folkloraj studoj oni ĝin traktu kiel fenomenon kaj ne taksu laŭ tio, ĉu tiuj valoroj, kredoj, ideoj kaj tabuoj estas bonaj, mavaj, stultaj, geniaj, forpelindaj aŭ konservindaj.

Ni finnoj havas certajn kliŝajn, sed tujajn imagbildojn pri diversaj aliaj popoloj: Rusoj estas ruzaj kaj malhonestaj (*"Kyllä ryssä on ryssä vaikka voissa paistais"*), hispanoj pigraj, sed viglaj, germanoj avaraj, italoj bonaj amantoj... Ni vidas nin mem apartenaj al eta popolo, ni konceptas nin iom strangaj, arbaranoj, distaj de aliaj eŭropanoj, ni havas malfacilegan lingvon, ni iom hontas, ke ni ne scipovas agi kaj vesti nin tre eŭrope (Blankaj sportŝtrumpoj anstataŭ dece nigraj...).

Aliflanke ni tamen tre fieras pri ni mem kaj ripetadas, ke naskiĝi en Finnujo estas kvazaŭ gajni ĉefpremion en lotumado. (*"On lottovoitto syntyä Suomessa"*). Paroli pri salajroj kaj ĉies personaj impostoj ne tre decas; svedoj, rusoj aŭ moŝtuloj de Bruselo (*"Brysselin herrat"*) por multaj estas malamikoj kaj nia heroaro konsistas el Väinämöinen, Kekkonen, militveteranoj, lanĉoĵetistoj kaj motorsportistoj. Ĉu ne? Kaj la dopadskandalo en skikurado apenaŭ havus tiom vastajn dimensiojn, se ne temus pri niaj naciaj herooj, nun eksaj.

Kiam vi esperantistiĝis?

Kio pri esperantistoj? Ekzistas ja niamondkoncepte esperantistoj kaj malesperantistoj. Ni vidas nin iom pli pacamaj, internaciaj, amikaj ol la malesperantistoj. Nia opinio ni havas eble iom pli da geamikoj kaj pliajn sciojn pri la mondo

ol malesperantistoj. Al malesperantistoj klare io mankas kompare al ni esperantistoj. Alikaze ni apenaŭ tiom zorgus pri ilia espereble baldaŭa esperantistiĝo, ĉu ne? Rimarku ĉi kuntekste, ke ni eĉ havas la verbojn *"esperantistiĝi"* kaj *"esperant(ist)igi!"* Goethe-instituto apenaŭ parolus pri *"germaniĝo"* de homoj.

En sociologia enketo farita en 1985 (Rezultoj el la libro "La Rondo Familia" de Nikola Rašić) preskaŭ 20%-oj da esperantistoj opinias, ke *"nia literaturo estas pli alloga ol la naciaj ĉar ĝi estas pli homama kaj internacia"*. Tia opinio bonege respegulas ĉi supran sintenon. Amuze estas, ke samtempe pli ol 60% el ni aŭ neniom legas esperante aŭ legas maksimume unu libron internacian kaj homaman jare...

Se mi demandus vin, kia estas tipa esperantisto, vi certe havus ian imagbilon prie kaj senhezite rakontus al mi kelkajn adjektivojn, ĉu ne? Ĉu biciklema vegetarana barbulo kaj sandalulo? Kun esperanta T-ĉemizo? Frazo *"Li povus esti esperantisto"* en niaj konversacioj montras, ke iajn stereotipojn ni ja kovas niakape. Nin mem ni povas ankaŭ facile dividi al kelkaj subgrupoj. Inter ni rekoneblas verdsteluloj, gravuloj, intelektuloj, bambistoj, eternaj komencantoj...

Mi amas esperantoN!

Valoro por esperantistoj ŝajnas ne esti internacia komunikado, sed komunikado senescepte esperante. Oni estas tre sentemaj al tio, ĉu iu parolas esperanton aŭ malesperanton en esperanta renkontiĝo. Pro la neceso tre atenti pri la lingvo naskiĝis amaso da verboj por priskribi ekzakte kiamaniere oni NE respektas ĉi valoron: *Krokodili, kajmani, aligatoro, lacerti*. (La ekzaktan signifon de tiuj ĉi verboj vi ne trovas en PIV, sed kutime lernas nur buŝe en espaj rondoj. Tre folklore.) Vera krimo kontraŭ la valoro estus paroli angle dum esperanta renkontiĝo. Paroli germane, itale, ĉine, arabe aŭ lingale ne estus simila rompo de esperantaj valoroj.

Sed ne sufiĉas paroli esperanton. Apartan valoron ŝajne havas ankaŭ la korekta uzo de akuzativo. Por subteni ĉi valoron ni havas multajn butonojn, glumarkojn kaj T-ĉemizojn kun la memoriga teksto "Mi amas esperantoN" aŭ "Mi neniam forgesas akuzativoN". Vivas firmaj kredoj pri tio, ke ekz. italoj neniam scipovas uzi akuzativon kaj akuzativfuŝulojn oni eĉ moketas. Iukiale korekta uzo de akuzativo funkcias kiel dividilo inter rudimentuloj kaj intelektuloj. Kaj iukiale ne same gravas fuŝa prononco, fuŝa uzo de participaj formoj, magra vortprovizo. Nur paroli esperanton kun bone lokitaj akuzativoj ŝajnas esti esperanta valoro.

Jen konkreta ekzemplo pri la akuzativa valoro kaj mokado de akuzativfuŝuloj el "Interkona letero" disdonita en junulara IS en Germanio jarŝanĝiĝe 1998-1999. La leteron oni plenigis kaj pludonis al dezirata persono.

Kara numero

Mi volas ekkoni vin, ĉar...

Vi aspektas tre simpatie

Mi ŝatas viajn ŝuojn

Vi havas tre belajn okulojn/manĝkuponojn

Komencanto(n)!?!?

Mi estas Italon

Ĉu eble la sentemo al korektaj akuzativoj havas rilaton al tio, ke idistoj siatempe kritikis esperantajn akuzativojn?

La angla havas pli ol 150 malregulajn verbojn...

La anglan ni klare tabuas. Folkloraj produktoj havas plej diversajn funkciojn: jen pure distran, jen sanigan, jen festorilatan, jen kredfirmigan, jen klarigan. Se nia celo estas la fina venko, imagu kio okazus al nia motivo kaj entuziasmo, se ni pli grandskale konfrontus la penson, ke la alstrebita fina venko neniam okazos, ke esperanto estas amuza hobia, sed krome nur eta, malgrava guto en la mondo. Aŭ imagu, ke alia planlingvo kun multe pli logika kaj simpla strukturo gajnus terenon en EU-aj instancoj!

Tabuoj ne estas tabuoj hazarde. Ni bezonas nian "malamikon", la anglan, la rakontojn pri tio, kiel aviadiloj falas pro la angla lingvo kaj kiel en la angla estas pli ol 150 malregulaj verboj dum en esperanto neniom. (Vd. Vekilo 4/2000, p.21). Ne hazarde la komparo okazas ĝuste inter esperanto kaj la angla. Kial ne inter esperanto kaj la franca aŭ la albana aŭ la japana?

Ekzisto de la potenca mondlingvo, la angla, ja havas klarigan funkcion. La angla bone klarigas multon, ekz. kial la fina venko ankoraŭ ne okazis. Ĝi klarigas ankaŭ, kial la junularo ne



El komikso de Arnau Torras.

interesiĝas tro pri esperanto. (Ili devas lerni LA ANGLAN en la lernejo, tio postulas fortojn kaj energion...) Ĉar ekzistas la angla, ni ne devas rigardi nin mem kaj cerbumi la tabuan penson, ĉu eble esperanto simple ne estas sufiĉe interesa kaj realisma, ĉu eble ni estas fuŝaj kaj malprofesiaj reklamistoj kaj varbistoj, malbone organizitaj, tedaj instruistoj...

Iom malpli pasie ni tabuas la konkurencon, aliajn planlingvojn. Aliflanke tre senteme kaj ĵaluzze esperantistoj reagis al novaĵoj pri europanto. Dum i.a. nuntempe volapuko, ido aŭ loj-bana restas al ni foraj, europanto danĝere tuŝis nian terenon, EUajn instancojn, kies atenton ni esperantistoj tiom volonte kaptus. Simila estis la reago pri ido pratempe, kiam esperanto kaj ido rekte konkursis pri atento de oficialaj instancoj. Vilho Setälä en *"Esperanto ja sen kilpailijat"* skribas preskaŭ detektivromanece pri *"idon rikos"*, krimo de ido.

Ankaŭ aliaj tabuaj aŭ sentovekaj temoj ekzistas laŭ nia popolkredo: *"Ĉu eble esperanto mortos?"*, *"Ĉu eble esperanto ne estas same esprimiva kiel aliaj lingvoj?"* Diru, ĉu VERE vi opinias, ke esperanto estas same freŝa, moderna, nuancoriĉa, esprimiva kaj tauĝa por kia ajn vivsituaĉo kaj beletra kaj scienca kunteksto kiel ekz. la angla? (Kiu el vi sentis ioman ekkoleron dumleĝe?)

La apostolo de la paco

Kiuj estus niaj idoloj kaj sanktuloj? Nu, idolo klaras: Plej kompreneble Zamenhof. Li ja esence kontribuis al mondo pli feliĉa kaj harmonia per kreado de esperanto. En la *Esperanta Antologio* poemas *Mozes Sh. Goldberg* (Esperanta Antologio/La turo babilona) pri la mondo sen esperanto kaj pri la espero kun esperanto. Al mondo venis malharmonio kaj malfeliĉo pro la dia decido disigi lingvojn. Sed venis monden esperanto kaj reportis esperon. Pluraj el la frutempaj poetoj nomis Zamenhof "majstro" kaj aldonis en siaj vortumoj al Zamenhof preskaŭ duondiajn trajtojn – idolojn kaj sanktulojn oni ja vidas kiel daŭrigantojn de dia laboro.

En enketo farita en 1985 (Raŝiĉ: La Rondo Familia) oni petis esperantistojn nomi 10 plej estimindajn personojn en la monda historio. La duan lokon en la listo okupis Zamenhof, kiun pluraj nomis *"la apostolo de la paco"*. Nur Mahatma Gandhi estis pli estiminda. Nelson Mandela, ekzemple, tute ne troviĝas sur tiu listo. La rezultoj de tiu enketo klare rakontas pri la duondieco de Zamenhof.

Kabe havas preskaŭ sanktulan pozicion en la esperanta mondo. Lian nomon oni elbuŝigas kun respekto. Oni malfacilege komprenas, kial tiom eminenta esperantisto libervole lasas ĉi harmonian kaj feliĉan movadon. Tiel Kaben vualas ia mistero kaj sekreto sanktuleca. Kabe sukcesas vekti sentojn eĉ en la "intelektulaj" rondoj. Laŭ enketoj, ju pli edukita esperantisto, des malpli li/ŝi kredas je vera utilo de esperanto en la vivo. Oni volus vidi esperanton kiel nuran hobion. Ankaŭ tio malfacilas, se samtempe oni okupiĝas pri mil kaj unu movadaj taskoj. Laŭ enketoj preskaŭ 60% el esperantistoj havas universitatan edukon. Eble tiel Kabe ricevis apartan valoron kaj atenton. Li donas al edukitaj skeptikuloj bonan mantron por momentoj, kiam oni eĉ mem ne komprenas, kial oni okupiĝas pri ĉi tia temporaba lingveto, kiu apenaŭ utilas. Mantre ni foje ripetas *"se mi ne kabeas/mi preskaŭ jam kabeis"*.

Beleĝe, se aldone pri Kabe vivus la kredo, ke li hantas la kongresan koridoraron...

Certe ankaŭ pliaj eminentuloj kaj gravuloj akiris idolan valoron, la du plej klaraj tamen klare estas Zamenhof kaj Kabe.

Popolmedicino

Ne ekzistas esperanta popolmedicino.

Festotradicioj kaj kalendaraj tradicioj

Apenaŭ ekzistas fiksjaj manieroj kiel festi nupton, naskĝitagon aŭ funeralon esperante, tiel esperantajn festotradiciojn oni povas tuj forgesi.

Kalendarajn tradiciojn ni tamen certe havas. Eble la zamenhofa tago (9.12) por multaj restas iom nebula kaj malkonata kaj ne fiksiĝis veraj

tradicioj kiel festi ĝin.

Sed kelkaj niaj renkontiĝoj okazas kun tia ekzakto kaj reguleco, ke oni povus ilin vidi kiel kalendarajn tradiciojn: *UK*, *IJK*, *IJF*, *IS*... Kelkaj el ili eĉ koincidas kun veraj kalendaraj tradicioj, *IJF* kun pasko kaj *IS* kun novjaro.

Al ĉiuj tiuj kalendaraj "festoj" krome ligiĝas multaj klaraj tradicioj, kiuj vivas kaj prosperas dumfeste: Kantado de himno, mesaĝoj sur la nigra tabulo, la urbestra akcepto, la silvestra balo, punkto de solecaj koroj, gufujo... Ĉu vi ne konas la vorton "gufujo" aŭ ĉu "nigra tabulo" diras al vi nenion? Tiukaze vi ankoraŭ neniam partoprenis *IS:n* aŭ *UK:n*. Ĉi tiajn vortojn kaj konceptojn oni ja heredas nur surloke, buŝe kaj folklore. (Jen escepte: Gufujo = en junularaj esporondoj alternativa ejo por diskoteko, punkta babilejo, teumejo, kie alkoholaĵoj kaj fumado estas malpermesataj kaj kie oni aŭdas beletrajn kurtprezentojn)

Memora tradicio

Per memora tradicio oni celas ĉiujn rakontojn, kiuj baziĝas sur memoroj de unuopuloj aŭ grupo kaj kiuj disvastiĝas buŝe.

Certe memora tradicio al esperantistoj ne mankas. Ekzistas memoroj pri diversaj renkontiĝoj – kiom da memora tradicio sole de la tamperea *UK* aŭ de la pasintsonera *KEF!* – kaj pri diversaj famaj figuroj de esperanta movado. *EAF* eĉ pasintjare organizis dum finnaj renkontiĝoj programerojn, kiuj baziĝis sur memora tradicio. Oni memoradis i.a. *Vilho Setälä*.

Certaj renkontiĝoj havas tiom fortan famon tra rakontoj kaj memoroj, ke oni ilin bone "konas", eĉ se oni neniam vere partoprenis. Tia estas ekz. la junulara *IS*, *Internacia Seminario*, ĉiujare post la kristnasko en iu germana urbo. En rakontoj ĝi aperas aparte bonetose, romancoj tie ne mankas, oni apenanŭ dormas, sed festas de vespero ĝis mateno.

Lige al la memora-rakonta tradicio naskiĝas eĉ verboj aŭ konceptoj, kiuj subtenas ĉi grupajn memorojn kaj amuzojn kaj kiuj havas signifon

nur por la partoprenintoj. Aŭ ĉu vi ridas, se vi aŭdas "*kukŝhaveni*" (Prepari pli bonan manĝaĵon por vegetaranoj ol por malvegetaranoj) aŭ "*rimini*" (Ne iri en diskotekon, sed anstataŭe fari privatajn, enĉambrajn, tekilumadajn festojn) aŭ la nomon *Vladimir Kolbašov*? Mi ne. Ĉar tiuj memoroj estas ne miagrupaj.

Vestoj kaj manlaboraĵoj

Esperantistoj ja ne havas naciajn kostumojn kaj veran manlaboran tradicion. Sed ia paralelo al la manlabora tradicio ekzistas en niaj T-ĉemizoj, butonoj, verdaj steloj kaj glumarkoj. Porti esperantlingvan T-ĉemizon kun verda stelo sur la brusto kaj kun du aldonaj butonoj "*Atomenergion, ne dankon*" kaj "*Mi amas esperanton*" jam preskaŭ estas iaspeca nacia kostumo. Ĉu iam esperantisteco disvastiĝos al ŝtrumpoj, orelringoj kaj kalsonoj?

Kurte, konklude

Ni fine konstata, ke ankaŭ esperantistoj klare havas sian folkloron, eĉ se certe ne same abundan kiam havas pluraj aliaj lingvaj grupoj. Ŝuldiĝas parte al la fakto, ke espistoj ne havas koheran komunan historion kun ĉaskutimoj, terkulturaj kutimoj, nuptotradicioj, antikva rakonta tradicio. Aliflanke ŝuldiĝas al la fakto, ke esperantistoj inter si ne havas tre oftan ĉiutagan kontakton. Sed ankaŭ al la tro mankohavaj kondiĉoj de esperantistoj mem pri la lingvo kaj pri ĝia literaturo.

Ni tamen havas niajn proprajn kalendarajn tradiciojn, prosperas esperanta rakonta kaj memora tradicioj, naskiĝas miniloraĵoj, la junularo havas sian ludtradicion kaj nia popolkredo estas klara kaj firma. Kaj la verdajn stelojn ne sukcesus entombigi eĉ la fantomo de Zamenhof, ĉu?

Riitta Hämäläinen

Brazila popbando komponis poemon de Zamenhof

Merlin: Ho! Mia kor'!

La dua kd de Merlin estas publikita per brazilaj fortoj, kaj ĝi estas verŝajne la unua esperanto-kd kiu enhavas kd-roman aldonajon. En la albumo la bando eksperimentas per diferencaj stiloj kaj entute uzas pli da modernaj komputilfaritaj sonoj ol en sia esperantia debuto *Por la mondo*. Krom la sudamerikaj gitaroj oni aŭdas nun ritmojn similajn al tiuj de la finnaj *Suurlähettiläät* kaj *Neljä ruusua*. La liriko sekvas la konatan linion, estas kantoj pri la malfacileco de amo kaj vivo kune kun aliaj metafizikaj demandoj.

Por montri sian adoron al la esperanta lingvo Merlin prezentas la delikatan poemon de Zamenhof, *Ho! Mia kor'!*, kun propra melodio. Poste sekvas nuntempa esperant-

tema kanto *Verda soldato*, fare de Emmanuel de Souza Lima. La teksto rakontas pri la dura vojo de kredbatalisto. ” – *Ŝtonoj post truoj, truoj post ŝtonoj. Venku obstaklojn, verda soldato, neniam rezignu de vera milito* – ”.

La perlo de la albumo estas *Nokta trajnejo* de la gitaristo Alvin Gandra. Li kantas sian pecon mem per mola kaj mistera voĉo kiu rememorigas pri la oldaj trankvilaj sambaĵoj de Jobim. Eterece sen patoso, trajnoj kaj amorĉo estas bezonataj por malpezigi la rektan etoson de *Ho! Mia kor'!* “*Nokto, malgrava nokto, dormigu min tiel trankvile. Rivero, tiel longa rivero, kunportu la literojn, ĝis la maro. Pluvo, ne malpurigu la bildon, perditan, mi bezonas vidi ĝin. Mi volus vidi vin, sed en mia sonĝo, la trajno jam foriris*”



Estas tre facile sekvi la tekstojn de Merlin aŭskulte. Sed kiam temas pri la kantisto Markone Froes, artikulado estas lokita antaŭ stilo. Ideologie de Flo Martorell, spirito de esperantia diskeldonado, estas tendenco strebi por tio ke vortoj aŭdiĝu aparte bone en esperantaj diskoj. Aŭdante kantadon de Markone, mi diru ke kantisto faru muzikon, etoson kaj interpreton sen kompromisi por pli bona kompreneblo – se io malklara, la publiko povas legi de la kd-a kajereto.

Patrik Austin

Himalaja renkontiĝo 2002

La 4a Internacia Himalaja Renkontiĝo okazos inter 26.2.-8.3.2002. La organizanto, Nepala Esperanto-Asocio celas kunvenigi eistojn de diversaj landoj sub la ombro de Monto Everesto (Ĉomolungma por tieuloj), la plej alta monto en la mondo – 8850 metrojn laŭ la plej aktualaj mezuroj. La renkontiĝo inkludas malhastan kvintagan rondpiedvojaĝon en la ĉirkaŭo de Everesto.

Kotizo ĝis 30.9.2001 estas 675 usonaj dolaroj po persono (inkluzivas manĝojn kaj loĝadon en 2-lita ĉambro). Petu aliĝilon ĉe Nepala Esperanto-Asocio, P.O.Box 10518, Kathmandu, Nepal. Fax: 977-1-227230. Rete: <www.esperanto.com.np>.

Esperantokursoj en Svedio

Internaciaj someraj kursoj en Lesjöfors, Svedio, 24-29 Junio 2001 en Esperanto-Gården, kursejo-gastigejo meze inter Stokholmo kaj Oslo, en okcidenta Svedio.

Ni invitas al semajnaj Esperantokursoj diversnivelaĵ – komencanta, progresanta, kaj konversacia. Ni ankaŭ havos kombinan komencant- kaj metodkurson por instruistoj – se la nombro da aliĝantoj sufiĉos. Infanoj kaj genepoj estas bonvenaj al la infana grupo, kie oni lernas per desegnado, ludado kaj kantado. Instruado 6 lecionojn ĉiutage kun svedaj kaj eksterlandaj instruistoj. Ankaŭ en la komenca kurso la parolata lingvo estos en la centro laŭ rekta metodo kaj studmaterialo ellaborita en la Esperanto-fako de Karl-skoga Popola Altlernejo.

Bv peti pliajn informojn ĉe Esperanto-Gården, S-68096 Lesjöfors, Svedio. Tel +46 (0)590-309 09, fakso +46 (0)590-303 59. Ret-adreso: <egarden@esperanto.se>, ttpaĝo: <www.algonet.se/~egarden>.

Baltaj Esperanto-Tagoj

La 37-aj Baltaj Esperanto-Tagoj, BET okazas inter 7.-15.7.2001 en universitata urbeto de Kaunas, Litovio. Celo de aranĝo estas spertointerŝanĝo pri aferoj de la E-movado kaj organizo. Pliaj informoj kaj aliĝo ĉe: Litova Esperanto-Asocio, pk. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio. Rete: <ritavalc@takas.lt>

Letervesperu en 2750-jara Samarkando

Samarkandaj esperantistoj preparas la internacian letervesperon, okazontan aŭguste 2001, dediĉitan al la 10-jariĝo de proklamo de sendependeco de la Respubliko Uzbekistano. Ĉiuspecaj tiutemaj materialoj (salutleteroj, reeĥoj, vojaĝimpresoj, nacilingvaj gazetartikoloj, libroj, turismaj broŝuroj, kantoj, poemoj, dokumentoj, fotoj, desegnaĵoj ktp pri Uzbekistano), fakte ĉio ajn pri la temo (eĉ fotoj de vialandaj vendejoj/restoracioj ks portantaj nomon "Samarkando", "Buĥara" ks!) estas tre bonvenaj kaj atendataj. Koran antaŭdankon por via partopreno!

Ĉiuj senditaĵoj estos eksponataj en la speciala muzea ekspozicio. La plej interesajn materialojn ni publikigos ankaŭ en nialanda nacilingva gazetararo. Krome, la plej aktivaj kontribuintoj ricevos specialajn uzbekiajn memoraĵojn, la noveldonitan esperantlingvan broŝuron "Samarkando por Turistoj" kaj la unuan uzbeklingvan E-lernolibron (kun du vortaretoj kaj konversacilibreto utilaj ankaŭ por eksterlandanoj!)

Bonvolu adresi ĉion jam nun al: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, UZ-703000 Samarkando, Respubliko Uzbekistano. Interreto: <<http://www.friends-partners.org/~ccsi/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm>>.

LIRO-2001

Urala Esperantista Societo (UES) kaj la redakcio de "La Ondo de Esperanto" invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso Liro-2001.

Liro-2001 havas ses branĉojn.

1. **Originala prozo:** ne pli ol 30 mil literojn longa

2. **Originala poezio:** la amplekso ne estas limigita

3. **Traduka poezio el la rusa lingvo:** poemo de Nikolaj Gumiljov "Ŝestoje ĉuvstvo"

4. **Traduka prozo el la rusa lingvo:** fabelo de Pavel Baĵov "Serebrjanoje kopytce"

5. **Traduka prozo el la angla lingvo:** novelo de O Henry "The Cop and the Anthem"

6. **Recenzo** de "Rusaj amnoveloj" (senpaga suplemento al "La Ondo de Esperanto" en 2000)

En ĉiu el la originalaj konkursoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2001 (RU-620077 Jekaterinburg-77, ab. ja. 67, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ la 15a de septembro 2001.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso de la konkursanto. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj. Konkursaĵoj senditaj rete ne estas traktataj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono (alilandanoj), aŭ rete <sezonoj@mail.ru>.

La laŭreatoj de Liro-2001 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31a de decembro 2003 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en "La Ondo de Esperanto", libroforme kaj elektronike, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis la 1a de marto 2002.

Halina Gorecka
sekretario de Liro-2001

Sveda labortendaro

Esperanto-Gården organizas ĉi-somere Laborbrigadon en Svedio.

Esperanto-Gården estas kursejo kaj gastigejo de Sveda Esperanto-movado, ĝi situas en okcidenta Svedio, meze de la distanco Stokholmo–Oslo. La tendaro de volontuloj estas aranĝita kune kun *Service Civil International* (SCI), internacia organizaĵo por tendaroj de volontuloj.

Ni organizas la trisemajnan volontultendaron, kiu komenciĝos la 24-an de junio 2001. Dum la unua semajno funkcios Esperanto-kursoj en diversaj niveloj. La partoprenantoj, kiuj jam konas Esperanton, kunhelpas en la kuirejo kaj la kursejo. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne parolas Esperante partoprenos la kurson.

Du sekvajn semajnojn ĉiuj okupiĝos pri riparlaboroj en la kursejo kaj la ĝardeno. Labora lingvo estos memkompreneble Esperanto. Por tiuj, kiuj volas daŭre studi Esperanton dum la tuta tendaro, ĉiutage estos organizataj kelkaj lecionoj.

Dum la vesperoj ni havos komunajn kunvenojn, kulturajn distraĵojn kaj amuzaĵojn.

Koncerne ekonomiajn kaj aliajn kondiĉojn validas la reguloj de SCI. La aliĝilo devas esti sendita al volontulorganizaĵo de via lando. La adreson vi povas trovi en In-

Informbazono

ternet ĉe CSI: <<http://www.ines.org/sci/>>. Vi povas ankaŭ ricevi la aliĝilon de Esperanto-Gården: <egarden@esperanto.se> aŭ laŭ poŝtadreso: Esperanto-Gården, SE-68096, Lesjöfors, Svedio. Fakso: +465 903 0359.

Vi ne bezonas skribi la aliĝilon en la angla lingvo, eĉ se tio staras en la informoj. Vi povas skribi en via gepatra lingvo kaj Esperanto. Bonvenon al kelkaj inspiraj Esperanto-semajnoj en Svedio! Konsideru, ke scioj de la angla lingvo ne estas bezonataj, eĉ se la informoj de via lando asertas tion.

Bengt Nordlof

<bengt@zeta.telenordia.se>

Somerkursoj en Aŭstralio

La Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio aranĝas la 18an somerkursaron de Esperanto en Perth inter 5.1.2002–18.1.2002. La kursejo estas St. George's College. Kursoj varias de nivelo 1 (komencantoj) al nivelo 4, kaj Cseh-metodaj kursoj je niveloj A, B kaj C. Ankaŭ eblas prepariĝi por la AEA Baza kaj Meza Ekzamenoj.

Plena kurskotizo estas \$220 ĝis 30.9.2001 kaj \$110 por plentempaj studentoj. Loĝado kaj manĝoj kostas aparte. Por aliĝiloj kaj pliaj informoj kontaktu: Esperanto League of WA (Inc), 33 Moore Street, East Perth 6004, Western Australia. Fakso: (08) 9325 7061, ttt-ejo: <www.iexpress.net.au/~esperanto>.

Sabira al Akademio

Sabira Ståhlberg estas elektita al Akademio de Esperanto. Gratulojn!

Aimo Rantanen

Aŭtunaj tagoj 28.-30.09.2001 en Helsinko

Mi aliĝas al la aŭtunaj tagoj

Nomo _____

Adreso _____

Tel. _____

Aliĝkotizo

Ĝis 30.06.2001 90/60 mk _____

Ĝis 14.09.2001 120/90 mk _____

Poste 150/120 mk _____

La pagintoj havas liberan eniron al ĉiuj aranĝoj ligita al la aŭtunaj tagoj. La dua, malpli kosta kategorio por membroj de FEJO.

Loĝado kaj manĝado

Manĝopaketo 160 mk _____

Deziroj pri manĝoj

Loĝado:

Mi zorgas mem pri mia loĝado

Amasloĝejo (nur por fejo-anoj)

Mi rezervas hotelĉambron jene

Mi pagas _____ mk al la konto Helsingin Esperantoseura Sampo 800017-1409105

Sendu la aliĝilon al:
Esperanto-klubo de Helsinko
Siltasaarekatu 15 C 65
00530 Helsinko

BONVENON!

**Syyspäivät 28.-30.09.2001
Helsingissä**

Ilmoittaudun syyspäiville

Nimi _____

Osoite _____

Puh. _____

Ilmoittautumismaksu

30.06.2001 saakka 90/60 mk _____

14.09.2001 saakka 120/90 mk _____

sen jälkeen 150/120 mk _____

Ilmoittautumismaksun suorittaneilla on vapaa pääsy kaikkiin syyspäivien tapahtumiin.
Alempi maksu FEJOn jäsenille.

Majoitus ja ruokailut

Ruokailupaketti 160 mk _____

Toivomuksia ruokailun suhteen

Majoitusvaihtoehdot:

Hoidan itse majoituksen

Yhteismajoitus (fejolaisille)

Varaan hotellihuoneen seuraavasti

Maksan _____ mk tilille

Helsingin Esperantoseura
Sampo 800017-1409105

Lähetä lomake osoitteella:
Helsingin Esperantoseura
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki

TERVETULOA!

**AŬTUNAJ TAGOJ
28.-30.9. 2001
EN HELSINKO**

**—LINGVOJ KAJ
(MIS)KOMPRENOJ**

- ◆ Literaturo
- ◆ Teatro
- ◆ Muziko
- ◆ Dancoj
- ◆ Lingva diverseco
- ◆ Internacia komunikado
- ◆ Lingvaj minoritatoj
- ◆ Ne-lingvaj esprimoj
- ◆ Esperanto kiel hejma lingvo
- ◆ Kiaj esperantistoj?
- ◆ Viglaj babiloj
- ◆ Novaj konatoj
- ◆ Eksterlandaj gastoj

Novajoj:

**Diservo en kapelo
de Tuomiokirkko 30.9**

Predikanto: Matti Pesonen

Orgenisto: Raimo Tanskanen

Lingva kvizo

inter teamoj de Caisa-anoj kaj esperantistoj

Dum vespera programo 29.9

Dolcxamar kaj Persone en Factory

Rokkoncertoj okazos en rokklubejo Factory,
Kaisaniemi, 28.9.

**Bv. rezervi vian hotelĉambron
plej laste ĝis la 15-a de aŭgusto.**

La estraro decidis

La estraro de EAF kunsidis la 28-an de aprilo en la oficejo kaj faris i.a. jenajn decidojn kaj konstatojn:

La definitiva bilanco de KEF-2000 ankoraŭ ne estis preta.

La estraro petas la laborgrupon pri Esperanto-lehti aperigi apartan rubrikon "aliaj gazetoj", en kiu oni recenzu tiajn artikolojn de aliaj gazetoj, kiuj iel rilatas al Esperanto.

La estraro klopodas serĉi informanton por la asocio.

La estraro rimarkigas, ke estas grave ricevi ĉiujn eblajn Esperanto-temajn gazetartikolojn kopie al la oficejo.

Estis konstatite la personoj, kiuj havas ŝlosilojn de la oficejo kaj tiuj, kiuj rajtas kolekti registritan poŝton direktitan al la asocio.

La estraro akceptis dokumenton "Hallinnollisia ohjeita", kiu estas unua parto de kolektota konsilaro por priskribi la funkciojn de la asocio.

Estis decidite kunvoki financan laborgrupon por pritrakti diversajn aktualajn monaferojn.

La estraro diskutis pri stipendio-petoj ĝenerale kaj pro aktualaj petoj. Jukka Vaijärvi estis elektita komisiito pri stipendioj.

La estraro konstatis, ke la someraj kursoj en Valamo bone allogis partoprenantojn kaj ke la aranĝoj estas en ordo. Same la estraro aŭdis, ke preparlaboroj por Aŭtunaj Tagoj en Helsinko antaŭeniras bone. Estis proponite, ke la sekvaj Vintraj Tagoj okazu en Mikkeli.

La estraro akceptis la jarraporton de la vortara laborgrupo. La pritraktado de la proponita eldonkontrakto pri la vortaro daŭros poste.

Jukka Laaksonen



Helju Viires el Tallinn vizitis Esperantoklubon de Jyväskylä.

Esperanto-gastoj en Jyväskylä

Dum la printempo du eksterlandaj esperantistinoj vizitis Esperantoklubon de Jyväskylä.

Helju Viires, estona Esperanto-aktivulo el Tallinn, kun sia filino partoprenis nian klub-vesperon la 18-an de aprilo rakontante pri Baltaj Esperanto Tagoj (BET). Tiu konata E-aranĝo okazas jam ekde 1959 preskaŭ ĉiujare alterne en tri Baltaj landoj Estonio, Latvio kaj Litovio.

Ŝi rakontis interese pri la evoluo de BET ekde la ĉefe sovet-junulara renkontiĝo ĝis la nuna multflanka kaj multnacia Esperanto-semajno kun prelegoj de fakuloj, lingvokursoj (ne nur de Esperanto), artaj programeroj, ekskursoj kaj multflanka vespera programo. Multaj finnoj jam partoprenis BET-on kaj kontentaj rakontis pri la aranĝo.

Helju mem respondicis multfoje pri BET en Estonio kaj sentis la preparlaboron instiga sed postula.

Dum la lastaj jaroj la aranĝon pli kaj pli partoprenis esperantistoj el t.n. okcidentaj landoj kun siaj deziroj. Multaj atendas, ke la loko estu ĉe la maro kaj proksime al iu granda urbo ktp. Tiuj



Sirkka Kolehmainen, Sinikka Koljonen kaj Mira Ruuska el Saarijärvi aŭskultas la prelegon.



deziroj kaŭzas, ke trovi konvenan lokon por BET fariĝos ĉiam pli malfacila. Ŝajnas, ke la venontsomera BET-37, kiu okazos 7-15 julio en la universitata urbeto de Litovia Agrikultura Universitato apud Kaunas en Litovio, estas ideala loko por la aranĝo.

La 2-an de majo hazarde partoprenis nian klubvesperon francino, instruistino Ginette Martin kun Raita kaj Matti Pyhälä, en kies hejmo en Lestijärvi ŝi pasigis kelkajn tagojn. Kun Raita kaj Matti ŝi vizitis ankaŭ esperantistojn de Oulu kaj vagadis en arbaraj padoj ĉe Lestijärvi.

Le temo de klubvespero estis la libro *La Eta princo* de la franca verkisto Saint-Exupéry, pri kiu rakontis al ni Norma Perälä kaj Aimo Nikander. Tiu ĉi libro estis kompreneble tre konata al nia gasto kaj post la prezento sekvis vigla diskuto pri tiu fama libro kaj

Franca gastino Ginette Martin kun Pentti Makkonen.

ties mesaĝo kaj al infanoj kaj al plenkreskuloj. La vespera renkontiĝo daŭris ĉe la manĝotablo de loka restoracio. Ĉi tiun amuzan renkontiĝon partoprenis ankaŭ tri lernantoj de Raita, kiuj februare partoprenis la esperantokurson en Saarijärvi.

Koran dankon al niaj gastoj kaj bonvenon denove!

Esperantoklubo de Jyväskylä



Ho ve, Helsinko! Porvoo gajnis 9-3

• Koŝmara tago en la helsinka, esperantista futbalo kaŭzis tuturban triston

Ĉi jare la helsinka teamo estis tre forta, eĉ kun kontribuo de aliurba stelula avanulo Mikko M. Tiel oni multon atendis antaŭ la FEF, Ĉampionecaj Ludoj pri Finnlanda Esperantista Futbalo. La 5-a de majo tamen iĝis koŝmaro por la helsinka teamo. Tiam okazis la FEF-finalo en la piedpilkejo Ravirata, en Helsinko. La maĉon gajnis Porvoo 9-3.

Turnopunkto dum la dua ludduono

La maĉo komenciĝis per klara premo ĉe la helsinka golejo kaj la unuan golon ŝotis Sarĉjo por Porvoo. "La unua golo ĉiam tre gravas. Tio

leĝerigas la ludetoson por la tuta teamo", rakontas Sarĉjo.

Dum la unua ludduono ambaŭ teamoj tamen preskaŭ samkvante golis. Sed la dua ludduono iĝis la turnopunkto por la maĉo. Porvoo klare pli bone utiligis la ŝoteblojn kaj la venko forglitis el la helsinkaj manoj.

"Dum la unua ludduono ni ankoraŭ gardis bonan ludharmonion. Sed en la dua ludduono io mistera okazis. Ni kreis multajn bonajn ŝoteblojn ĉe la porvoo-a golejo, sed senrezulte", bedaŭras Riitta.

En la fino helsinko ankoraŭ retrovis sparkon por la ludo kaj Jukkis ŝotis la trian golon por Helsinko. Sed la ludtempo jam ne plu sufiĉis por forigo de la goldiferenco.

"Ili ludis kiel ŝafinaro. Ni estis lupoj." ▷



Teamo de unuiĝintaj ĉefurboj malgajnis: Riitta, Liisa, Pipsa, Katja, Jukka, Mikko.



Porvoo-a teamo gajnis: Sarĉjo, Pieĉjo, Timo, Stodoe, Hipo.

Agado de Esperantosocieto Antaŭen

Klubvesperoj okazos en la klubejo Nesto, Satakunnankatu 30 C 6. La vesperoj okazas lunde kaj komenciĝas je la 17a.

La enirejaj pordoj fermiĝas aŭtomate precize je la 17a, tial bonvolu veni iom pli frue.

Somero

“Kafo/teo je la sesa” -okazoj en kafejo Soolo de Tampere-halo ekde merkredo 6.6. kaj finiĝos 29.8. Ĉiujn merkredojn se la kafejo estas malferma.

Aŭtuno

10.9 Septembra vespero. Someraj memoraĵoj kaj bildoj.

8.10. Oktobra vespero. Ni ricevas gaston el Usono, Sylvan.

Esperanto-kurso

Pensiula Esperanto-grupo de ETY daŭre kunvenas dum aŭtuno en Nesto, ĉiun duan merkredon je la 12–13. Komenco 12.9. Gvidanto Pentti Järvinen.

Momentoĵ ĉe vino

Naŭ personoj gustumis kelkajn vinojn en la helsinka esperantoklubo. La ideo estis lerni ankaŭ alian opinion ol ”Mi ŝatas aŭ mi ne ŝatas la vinon...”. Helpas taksati vinojn, se oni dividas la taksadon en pli malgrandajn partojn, ekzemple: aspekto, aromo kaj gusto.

Por kelkaj homoj bona vino signifas multekostan vinon kaj ili trinkas laŭ etiketoj. Feliĉe la afero ne estas tiel simpla. Ni elektis malmultekostajn ruĝajn vinojn kaj havis du malpezajn, du duonmaturajn kaj unu maturan vinon. Granda surprizo estis, ke nur unu homo ŝatis nian maturan vinon. La favorito de la gustuma grupo estis: MILCREEK MERLOT (Makedonio)

aspekto: ruĝa; aromo: frukta;

gusto: malpeza, mola; vinbero: Merlot 100 %

Eeva Vaijärvi

Gustumado de blankaj vinoj

28.8. (mardo) je 18.00 en la oficejo

NEPRAS anonci sian

partoprenon al Eeva!

<evaijarvi@yahoo.com> aŭ

telefone al la oficejo: 715 538

▷ ”Ili ludis kiel ŝafinaro. Ni estis lupoj”, ridetas Hipo, la golreĝo de la maĉo.

”La helsinkaj arieruloj ne haltigus eĉ laman testudon”, daŭrigas Sarĉjo. ”La maĉo estis por ni tre facila!”

En la helsinka teamo la mienoj estas pli seriozaj.

”Kia desapontiĝo. Ĝus nun malfacilas pensi pri daŭrigo. Mi ne komprenas...”, suspiras silente Riitta kaj larmo fluas el ŝia okulangulo. ”Ni ludis bone. Ni havis bonan teamon. Sed hodiaŭ ne estis nia tago.”

Seriozaj misoj en trejniĝo, lezoj en la teamo

”Ni simple devas pli serioze trejniĝi. Nun io misis en la antaŭprepariĝo. Ankaŭ iom influis

nian teamon grava genua lezo de Eeva, nia centra avanulo, kio malebligis al ŝi ludadon”, analizas Jukkis post la maĉo.

”Sed venontjare Helsinko triumfos kaj jubilos!”, certas Katja.

Ombro sur sporta pejzaĝo?

Laŭ anonima fonto oni faris strangan malkovron maltantaŭ la porvoo-a golejo post la maĉo: Malplenaj ladskatoloj. Laŭ la etiketo la enhavo konsistis el hordea likvaĵo. Laŭ specialistoj tia-speca hordea likvaĵo povas stimule efiki sur centra nervaro kaŭzante plialtiĝon de batalemo kaj motiviĝo de piedpilkantoj. La porvoo-a teamo rifuzis doni siajn komentojn rilate ĉi seriozajn suspektojn pri dopado.

POR vai PRO?

Joissakin tapauksissa on melkein sama, kumpaa prepositiota käyttää, POR vai PRO:

Mi dankas vin pro (tai por) via letero.

Por kio ni kunvenas? Miksi kokoustamme? (Mitä tässä on tarkoitus saada aikaan?)

Pro kio ni kunvenas? Miksi kokoustamme? (Mikä mennyt asia on kokoukseen syynä?)

Ero prepositioiden POR ja PRO välillä on periaatteessa se, että POR osoittaa tulevaisia asioita, aietta, hankintaa, tulosta johon pyritään, kun taas PRO viittaa menneeseen, asioiden syihin. PRO on myös täsmällisempi ja sen käyttö vähäisempää kuin POR-preposition.

Pro kio vi ploras? = Kial vi ploras?

Li amas ŝin ne pro ŝia beleco sed pro ŝia bonkoreco.

Okulon pro okulo, denton pro dento. Silmä silmästä, hammas hampaasta.

propeka kapro syntipukki (eläin tapetaan ihmisten syntien vuoksi)

Vertaa tilanteita:

Li mortis por la patrujo. Hän kuoli isänmaan puolesta.

Li mortis pro la vundoj. Hän kuoli haavoihinsa.

POR

Monet POR-ilmaisut voisi kääntää yhdyssanalla:

pago por la abono, tilausmaksu; *preparoj por la festo*, juhla valmistelut; *ĉambro por la gastoj*, vierashuone; *kuracisto por virinoj*, gynekologi; *akvo por trinki*, juomavettä; *vestoj por infanoj*, lastenvaatteet; *la fervoro por Esperanto*, esperantoinnostus.

Usein POR on verbin edessä:

Ili havis nenion por manĝi.

Ni havos multon por fari.

diri ion por ies laŭdo, sanoa jotain jonkun kiitokseksi/ylistykseksi

aranĝi ion por ies honoro, järjestää jotain jonkun kunniaksi

tro fiero por pardonpeti, liian ylpeä pyytämään anteeksi.

Jos predikaatti ilmaisee liikkumista, niin sen jälkeen ei POR ole tarpeen:

iri fiŝkapti, mennä kalaan; *kuri savi iun*, juosta pelastamaan joku; *veni viziti iun*, tulla vieraisille; *sendi venigi kuraciston*, lähettää hakemaan lääkäriä; *veturi trarigardi la landon*, matkustaa maata katselemaan.

Tällaisissakin tapauksissa tarvitset PORia:

aĉeti bombonojn por 20 markoj, ostaa karkkeja 20 mk:lla; *la benzino kostas po 4 markoj por litro*; *por tiu prezo ĝi ne estas kara*, siihen hintaan se ei ole kallista; *preni iun por iu alia*, luulla jotakuta toiseksi; *kanti por si mem*, laulaa itsekseen; *tio estas por mi indiferenta*, se on minulle samantekevää; *diskuti la por kaj la kontraŭ*, puhua asian puolesta ja sitä vastaan; *ŝtono servis al ni por seĝo*, meillä oli kivi istuimena.

Ja vielä sananlaskuja, joille saat itse keksiä nasevammatt suomennokset:

Por la mono romp' de leĝo. (Raha rikkoo lain)

Estas tempo por ĝemi kaj tempo por danci. (Surulla ja ilolla on aikansa)

Ĉiu por si, por ĉiuj Di'. (Jokainen ajaa omaa asiaansa ja Jumala kaikkien)

Mutta kävikö tässä nyt niin että ”*Pro multo de arboj la arbaron ni ne vidas*”?

Saliko

Kielipolitiikasta

Esperantolehden tunnuslaatikossa on luokitte-
luna: kielipoliittinen aikakauslehti. Moni on ky-
sellyt, mitä kielipolitiikka Esperantolehden yh-
teydessä tarkoittaa, onko kyse esperanton avul-
la tehtävästä politikoinnista vai mistä. Kieli-
politiikka on eräs kielitieteen haara. Tarkemmin
sosiaalilingvistiikkaan, kieltä yhteiskunnallise-
na ilmiönä käsittelevään tutkimukseen kuulu-
van kontakti- ja areaalilingvistiikan osa. Se puo-
lestaan tutkii kielten kohtaamista ja alueellista
jakautumaa.

Kaikkein onnellisimmin kielten kohtaamises-
sa käy kun tapahtuu kaksikielistyminen, ihmisen
osaa sekä tunkeutujakieltä että äidinkieltään
yhtä hyvin. Silloin hänen on pitänyt olla mo-
lempien kielten vaikutuksen alla jo lapsuudes-
taan saakka. Mutta voi olla myös vähemmän
miellyttäviä vaihtoehtoja. Puolikielistyminen,
jolloin kahta kieltä käyttävä ei osaa kumpaakaan
kieltään täydellisesti. Vielä pahempia seurauk-
sia kielten kohtaamisesta voi olla vähemmän
vaikutusvaltaisen kielen kuolema, onnellisem-
massa tapauksessa tunkeutujakieleen sekoittuu
vähemmän vaikutusvaltaisen kielen aineksia,
jolloin syntyy sekakieli, kreoli tai pidgin.

Kielipolitiikka kielitieteen osa-alueena tutkii
kansainvälisten järjestöjen, kuten YK ja ILO,
sekä eri valtioiden ja valtioliittymien kieli-
politiikkaa. Joten tutkimuskohde ja tieteenalan
nimi on sama. Mielestäni kielipolitiikasta voisi
kehittyä sosiaalipolitiikan kaltainen monen tie-
teenalan kohtaamispaikka vuosien mittaan, nyt
kun jokainen suomalainen joutuu ottamaan sii-
hen kantaa globalisaation, pakolaiskysymyksen,
Euroopan Unionin kielipolitiikan ja vähemmistö-
kielten kohtelun yhteydessä. Tutkittavaa riit-
tää aiempaa enemmän, koska yhtenäiskulttuu-
rin aika on takanapäin.

Helsingin Sanomissa oli torstaina 26.4.2001
esittely Euroopan pienten kielten konferenssis-

ta, joka pidettiin Latvian pääkaupungissa Riia-
ssa. Euroopan vähän käytettyjen kielten toimis-
ton pääsihteeri Tom Moring kertoi Euroopan
vähemmistökielten sopimuksesta, jonka on al-
lekirjoittanut 25 maata ja ratifioinut 13. Nizzan
huippukokous hyväksyi perusasiakirjan, joka
kieltää kielellisen syrjinnän ja tukee kielidiversi-
teettiä, kielellistä monimuotoisuutta. Sopimus
ei kuitenkaan sido jäsenmaita.

Tohtori Tove Skutnabb-Kangas Roskilden
yliopistosta sanoi, että kielet menettävät aluei-
taan, kun yliopisto-opetusta annetaan englannik-
si ja liike-elämä, etenkin monikansalliset yhtiöt
alkavat toimia englannin kielellä. Tohtori Skut-
nabb-Kangas totesi myös, että Eurooppa on kie-
lallisesti köyhin maanosa. Ellei se pysty säilyt-
tämään edes näitä suhteellisen harvoja kieliään,
ei sillä ole oikeutta arvostella muita. Miten rik-
kaat ja suuret Euroopan maat voivat väittää, et-
tei koulutuksen järjestäminen useilla kielillä ole
mahdollista? tohtori Skutnabb-Kangas kysyi.
Eurooppa on levittänyt maailmalle yksikieli-
syyden ideologian.

Professori Robert Phillipson sanoi, että EU:n
tulkkauksessa on erilaisia kielipareja nyt 110.
Tulevaisuudessa, itälaajennuksen jälkeen, niitä
on jo 210. Artikkelin mukana olevat tilastotiedot
kertovat, että vain 3% maailman kielistä on eu-
rooppalaisia. Maailmassa on 6000–7000 kiel-
tä. Niistä pelkästään Papua–Uudessa Guineassa
puhutaan 847, Indonesiassa 655 ja Nigeriassa
367. Puolet kaikista kielistä on sellaisia, että
niillä on 100 000 puhujaa. Mediaanisesti kulla-
kin kielellä on 5000–6000 puhujaa. Kieliä kuo-
lee nopeammin kuin eliölajeja. Kielidiversiteetti
pienenee nopeammin kuin biodiversiteetti.

Aimo Rantanen

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☎ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantokerho / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☎ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Käräjätörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☎ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ fejo@esperanto.fi
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ Ritva.Sabelli@sfs.fi ☎ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2001**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
½ sivua 400 mk	½ sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarencatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Forpasoj

Liisi Oterma (1915-2001)

Profesoro, d-ro Liisi Oterma mortis 4.4.2001 en Turku, kie ŝi naskiĝis 6.1.1915. Kune kun Y. Väisälä ŝi laboris en la Universitato de Turku ĉe astronomia fako inter 1939-1978; kiel profesoro ekde 1962. Ŝi partoprenis en trovado de kelkcentaj planetetoj, i.a. unu nomita Oterma, kies sorton ŝi kalkulis. Post la doktora disertaĵo oni donis al ŝi honoran titolon Virino de la Jaro.

Y. Väisälä instigis sian kunlaborantinon Liisi por ekstudi Esperanton, kiun ŝi bezonis en korespondado kun eksterlandaj kolegoj kaj en redaktado de la revuo "Tähtitaivas" (Stela ĉielo), kiu ĉiam enhavis ankaŭ resumon en Esperanto. Liisi fariĝis Dumviva kaj Honora Membro de UEA. Ŝi tre multe vojaĝis, partoprenis Universalajn Kongresojn, aktivis en lokaj studrondoj kaj kursoj. Delonge ŝi oficis kiel revizoro en la Esperanto-societo de Turku. Oni memoras ŝin kiel modesta kaj volonte retiriĝema persono, kiu konstante apogis Esperanton kaj E-an agadon.

Harri Melasniemi (1934-2001)

Harri Melasniemi forpasis en 3.5.2001 en la aĝo de 66 jaroj. Esperanto estis al Harri pli ol grava. Li aktivis sur tri niveloj: loka, landa kaj internacia. Informado estis proksima al lia koro, ankaŭ kompreneble instruado. Kiel vivanta fiŝo li naĝis en televida, radia kaj gazetara medioj utiligante iliajn servojn kaj eblecojn. En rotariaj kaj leonaj rondoj li estis konata preleganto. Li estis vere multflanka, kapabla aktivulo.

Raimo Pystynen (1930-2001)

Instruisto Raimo Pystynen mortis 24.1.2001 en Porvoo. Li naskiĝis 19.5.1930 en Vahviala kaj faris sian vivlaboron en Hamina. Li estis specialinstruisto kaj instruis en helplernejo. Raimo komencis studi E-on en Kajaani, kie li studis por esti instruisto kaj ekzamenis 1953. Li ne interesiĝis pri E-societa agado, sed persone li multe laboris por Esperanto kaj havis multajn E-ajn kontaktojn. Liaj aliaj hobiaj inkludis lingvoj, fotado, filmado kaj verkado (i.a. por teatro kaj radio).

En lia familio restis edzino kaj tri gefiloj.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuun alussa. Jutut 15.7.2001 mennessä Aimo Rantaselle. Venonta numero aperos en la komenco de aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2001 al Aimo Rantanen. Osoite/adreso: PL 2, FIN-40801 Vaajakoski, puh/tel. (014) 261 438, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.